


# Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2023

Jarkolekto 10 - Numero 3



# ENHAVOTABELO

de julio 2023

Titolpaĝo .....	1
Enhavotabelo .....	2
De ni por ... ni! .....	3
Moneroj & medaloj .....	5
<i>Eduards Jaunvalks (1901-1989)</i>	
<i>Jubilea medalo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1987</i>	
<i>Medalo pri la sieĝo de Rejselo en 1708</i>	
<i>Deka Brita Kongreso 1919</i>	
Spikumajoj & suplementoj: <i>Radio Polonia 30 000a elsendo: skizoj...</i>	10
Aspektoj de numismatiko: <i>Patino</i> .....	11
Valormarkoj & valorbiletoj: <i>Fillér-Libro-Marko el Budapeŝto</i> .....	15
Por spuremuloj: <i>Vaksaj sigeloj</i> .....	16
Medalistoj: <i>33Raoul - Eugène Lamourdedieu (1877–1953)</i> .....	17
Historiaj aspektoj: <i>Post la venko super la hitlera Germanio (1985)</i> ....	19
Terminaro: <i>alfabeta listo (34)</i> .....	21
Numismatika forumo: <i>Ĉu monero, ĵetono aŭ medalo?</i> .....	22
El la gazetaro: <i>Honore al William Harmon</i> .....	25
Retpoŝto .....	26
Anoncoj & eventoj .....	30

*Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)*

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts  
Provlegado: Jozefo Horvath  
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!  
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)  
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>  
[www.esperanto.es/biblioteko](http://www.esperanto.es/biblioteko)  
[www.kolektado.esperanto.cc](http://www.kolektado.esperanto.cc)

## DE NI POR ... NI!

*Por la mono pastra preĝo,  
por la mono romp' de leĝo.  
(Zamenhofa proverbaro)*

La ENA-redakcio invitas vin denove trafolumi kaj – laŭ viaj volo kaj intereso – admiri “novajn” medalojn (ofte tre diversaj numismatikaĵoj) kaj malkovri interesajn informojn, kiujn elenigmigas por vi esperantaj medaloj.

Komence, jen la dua parto de la medala trezoro de J. Strupulis, rekordulo pri la nombro de esperantaj medaloj, kreitaj de nur unu medalisto en lia tre persona stilo. Ni ankaŭ montras skizojn, kiujn sendis Strupulis al nia redaktejo, dankante pro la mencio en la pasinta numero de lia unika rekordo. Ni esperas, ke li estontece denove kreos iun novan artefakton rilate al la Internacia Lingvo. Bedaŭrinde, ENA, ja “riĉa” sed senkasa asocio, ne posedas monon por mendii ĉe kara Jānis medalon, por memori la baldaŭan kompletigon de la deka jarkolekto ...

En la rubriko “Moneroj kaj medaloj” jen kvar diversaj esperanto-artefaktoj preteriĝas por tenti viajn okulojn kaj vian koron. Ĝuu profunde!

Tute freŝa temo estas la demando ĉu *vaksaj sigeloj* ankaŭ estas eroj de numismatiko. Krom la substanco, la aspekto de tiuj objektoj similas al tiu de unuflankaj medaloj. Do, eble oni povus konsideri ilin provizore almenaŭ parencaj unuj al la aliaj.

Diversfoje legantoj jam montris sin scivolemaj pri la ekesto kaj graveco de patino sur (mal)novaj numismatikaĵoj. La koncerna artikolo en ĉi numero ne nur detale informas pri tiu fenomeno, sed ankaŭ klarigas la diferencon inter *patiniĝi*, *patinigi* kaj *eĉ malpatinigi*!

Valoras krome mencii, ke ĝis hodiaŭ, ni trovis nur unu esperantan medalon, kiu memorigas pri la venko de la demokratio super la (hitlera) faŝismo. Raporto kun historia valoro el Esperanto-revuo, realisme pentrita de sur la batalkampoj en la tiama Rusio, kiel en filmo rakontas pri la krueleco de iamaj kaj aktualaj militoj.

Tiurilate ni volas ankaŭ mencii kaj nepre rekomendi la legadon de neforgesebla priskribo de la kruelaj kaj vanaj tranĉeaj masakroj dum la unua milito, rakontitaj de ĉeestinto en ne sufiĉe konata verko de la iom nekonata pioniro FeZ, Felikso Zamenhof, frato de Ludoviko: “*Terura kvaronhoreto sur la okcidento – Nenio nova*” (el: “*Verkoj de FeZ*”, p.202).

Vi certe ne forgesu ankaŭ trafolumi la lastajn paĝojn, kiujn ni kiel kutime rezervas por anoncoj kaj eventoj en Esperantujo rilate al numismatiko.

Agrablan legadon!

Bert

La esperanta trezoro de Strupulis: parto 2



## MONEROJ & MEDALOJ

### Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

EDUARDS JAUNVALKS (1901 – 1989)



Lando: Latvio

Metalo: bronzo

Diametro: 78 mm

Jaro: 1989

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: Jānis Strupulis

Diko: *serĉata*

#### ***Averso:***

supre: “EDUARDS JAUNVALKS”

meze: busto trikvarone dekstren

maldekstre: medalista signo: S]89 (kun jarindiko)

sube: “1901-1989”

#### ***Rimarko:***

Jaunvalks esperantistiĝis en 1918 kaj poste iĝis UEA-delegito.

En 1925 li fondis Esperanto-grupon en la urbo Llepaja.

Krome li tradukis latvajn popolkantojn en Esperanton.



## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

### Jubilea medalo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1987



Lando: Ĉeĥio  
Metalo: tombako  
Diametro: 60,5 mm  
Jaro: 1987



Kvanto: 250  
Pezo: 95g  
Medalisto: Jiří Harcuba  
Diko: 5 mm

#### ***Averso:***

maldekstre: “DR LAZAR LUDWIG” ; fragmento de busta profilo de Zamenhof  
dekstre: “ZAMENHOF” eko de la maldekstra flanko de granda stelo kun granda litero E  
sube: “HARCVBA 87”

#### ***Reverso:***

supre-maldekstre: jubilea UEA-blazono ĉirkaŭ mondoglobo super ornamaĵo  
tutmeze: vertikala disigilo  
ĉirkaŭe: “ESPERANTO 1887 – 1987”  
meze: ĉirkaŭa skribo: “ELDONIS ĈEĤA ESPERANTO – ASOCIO”

#### ***Rimarko 1:***

pri la medalo: vidu jk.10, n-ro 2, p.9

#### ***Rimarko 2:***

pri J. Harcuba: vidu jk.4, n-ro 4, p.13

#### ***Rimarko 3:***

pri alia esperanta medalo de Harcuba: vidu jk.4, n-ro 3, p.5

## Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Medalo pri la sieĝo de Rejselo en 1708, montranta la Babelan Turon



Lando: Nederlando

Metalo: arĝento

Diametro: 49 mm

Jaro: 1708

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 35,72 g

Medalisto: Caspar

Diko: *serĉata*

### **Averso:**

ĉirkaŭe: “CONFVNDAMVS LINGVAM EORVM.VT NON AVDIAT VNVSQVISQVE VOCEMPROXIMI SVI.”

= (ni konfuzu ilian lingvon, por ke ili ne aŭdu (komprenu) reciproke la voĉon de sia proksimulo [el Moseo III: 7]). Laŭ Zamenhof: Ni konfuzu ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de la alia.

meze: bildo de fazo de la konstruado de la **babela turo**, kiam la laboristoj ekfreneziĝis, ĉar tuj neniu komprenis la najbarojn.

Sube: (en tranĉsubo): “RYSSEL VEL INSVLÆ PER  
PRINCEPEM EVGENIVM OB-  
SESSA 22. AUG. ET 23  
OCT. RECERTE  
1708.”

= (Rejselo aŭ Insuloj de princo Eŭgeno ekde la 22a de aŭgusto sieĝataj kaj konkeritaj la 23an de oktobro 1708)

## **Reverso:**

ĉirkaŭe: “SISTE SOL IN GIBEON ET LVNA IN VALLE AIALON”

= (suno, haltu super Gibeon kaj luno super la valo de Ajalon [du bibliaj urboj, kiuj estis rezistintaj la tiamajn israelanojn, gviditajn de Josuo kaj konkeritaj per la helpo de Javeo - ])

meze: bildo de la suno kaj de la luno super la bombardita urbo. Sub la luno la vorto “cittadelle” (= *citadelo*)

sube: (en la tranĉsubo): “CASTELLVM RYSEL OBSES:  
SVM XXVII OCT. RECERTVM  
VERO IX DEC.”

= (la citadelo de Rejselo, sieĝita de la 27a de oktobro konkerita vere la 9an de decembro 1708)

rande: “VNITA VIRTVS VALET” = (konkorde kuraĝo fortas [laŭ imperiestro Tito])

## **Rimarko 1:**

ekzistas ankaŭ oraj ekzempleroj



## **Rimarko 2:**

Rijsel (Rejselo) pasintecce estis la nederlandlingva nomo de flandra urbo en Franca Flandrujo, kiu poste iĝis nordfranca urbo kun la nomo Lille (Lilo), kie en 2018 okazis la centa, jubilea UK.



## Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

Deka Brita Kongreso 1919



Lando: Britio  
Metalo: bronzo  
Mezuroj: 40 mm x 37 mm  
Jaro: 1919

Kvanto: *serĉata*  
Pezo: 10,14 g  
Medalisto: *serĉata*  
Diko: 1 mm

### ***Averso:***

antaŭe: verda emajlita stelo kun orumita, inkluziva pendigileto; ruĝa emajlita ringo kun orumita surskribo: “• LINGVO INTERNACIA • ESPERANTO”. En la centro de la ringo verda emajlita steleto. Fone: laŭrokrono bronzkolora

sube: blu-violeta rubandeto emajlita, kun surskribo: “10<sup>A</sup> BRITA KONGRESO  
+ LIVERPOOL 1919 +”

### ***Reverso:***

nomo de la medalfirmao: P. H. MANISON / BIRMINGHAM

### ***Rimarko:***

rara Esperanto-insigno, kreita de fama firmao en Birmingham (Britio), komence de la 20a jarcento. Ĝi precipe faris insignojn ne-esperantajn por policoj en la tuta mondo. La montrata insigno el 1919, kreita por la nacia kongreso, estas la nura konata ekzemplero.

## *SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ*

### **Radio Polonia 30 000a elsendo: skizoj far S-ro Strupulis**



Antaŭ nelonge, sekve de la unua parto en nia revuo pri la strupulisaj esperantaj medaloj, la artisto afable sendis al la redakcio kopion de slipo kun diversaj skizoj pri la preparado de la memormedalo RadioPolonia okaze de la 30 000a elsendo en 1986.



Tiu medalo jam estis montrita kaj priskribita en jarkolekto 6, n-ro 4, p.4

*La redakcio de ENA kore dankas sinjoron Strupulis pro la surpriza donaco.*

# ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

## Patino

### A. Difino

“Patino: natura, alteracia tavolo, kreiĝanta sur ŝtonoj, vitro kaj metaloj, kies koloro (blanketa, verdgriza k.a.) estas diferenca de la cetera materialo.” (PIV)


### B. Patiniĝo

Patino, ankaŭ nomata “nobla rusto” aŭ “kupro-rusto” estas malbrila korodo-tavolo sur la surfaco, precipe de kupraĵoj kaj alojaj surbaze de kupro (ekz. bronzo), pro la oksidiĝo de la metalo kaŭze de elmetado al la influo de aero kaj humideco. La koloro povas varii de verda ĝis malhelbruna. La diferenco dependas de la tre agresiva influo de la acido en pluveroj aŭ la malpli rapida oksidiĝo de kupro kaŭze de la influo de la oksido en la aero. La kreskado de patina tavolo povas daŭri dekojn da jaroj. Spontana kupra patino konsistas el bazaj kuprokombinaĵoj, kiel karbonato, sulfato kaj klorido.

La proceso de la influado de plombo en la libera aero malrapide kaj iompostiome kreas plomboksidan tavolon de apenaŭ solvebla kaj forigebla arĝentgriza koloro.

### C. Malpatinigo

En epokoj, kiam riĉuloj ne nur posedis, sed ankaŭ regule uzis doman ilaron kiel metala manĝilaro, tre ofte el arĝenta alojo, estis kutimo “purigi” la aĵojn post la manĝado kaj ankaŭ briligi regule, do belŝajnigi ilin por ekspone ilin en vitroŝrankoj, por superblufi vizitantojn.



La jena objekto, maldekstre, montras per blueca patino la unuan fazon de spontana patiniĝo. Sekve la koloro evoluos al griza-nigra patino. Dekstre la sama objekto, purigita kaj briligita. Ĝi estas antikva laktopoteto el la iam famega hotelo Astoria en la belga ĉefurbo Bruselo.

Tamen ni ne forgesu fakulojn kiel advokatoj, medicinistoj, komercistoj ktp, kiuj metas kupran aŭ latunan ŝildon sur la fasadon, por anonci kaj reklami la propran profesion.



#### D. Patinigo

Ekzistas ankaŭ metodoj por patinigi artajn (kaj aliajn) objektojn. Tiu tekniko estas ofte uzata por patinigi bronzajn skulpturojn. La patinigo kaŭzas belegan, brilan strukturon. Kemiaĵoj ebligas patinigon per varma aŭ malvarma labor teknikoj. Laŭ la “varma” metodo estas aplikata “varmigado”, kutime per uzo de gasbrulilo.

La dua metodo preferas la naturan atmosferon. Per broso aŭ tuko oni surmetas patinigilon kemian, kiu influas la bronzon. Diversaj substancoj kaŭzas diversajn kolorojn. Ekzemple kaliapolisulfido nigrigas la surfacon. Feranitrato kaj kaliapermanganato kaŭzas brunan, kurpranitrato verdan koloron ktp. Por briligigi kaj samtempe protekti la patinon, la objekto estas kovrata per vakso. Foje la artaĵo estas kovrata per farbotavolo aŭ glazuro (ekzemple per pigmentoj kaj vakso) kaj prilaborata per skrapado, frotbriligado aŭ polurado. Antroj estas akcentigataj per malhela kolorigilo, la reliefaj partoj per malpli malhela koloro.


#### E. Patiniĝo kaj patinigo en la numismatiko

En la numismatiko patiniĝo estas priskribata kiel erozio de la metalo aŭ alojo de moneroj kaj medaloj. Patino estas konsiderata tre pozitiva eco de numismatikaĵoj (ĝi ankaŭ estas signo kaj pruvo de la aŭtentikeco de antikvaj moneroj), kaj la forigo de la patino estas ege malkonsilinda.

Patina povas ankaŭ esti surmetata kemie. Bedaŭrinde tio ofte okazas trompcele, por doni al falsaj antikvaĵoj la aspekton de veraj valoraĵoj.

#### F. La rezulto kaj utilo de artefarita patino en la numismatiko

Tamen ankaŭ la patinigo de (novaj) medaloj povas havi pozitivan rezulton. Jen iom pli detale bona ekzemplo:



La patinigo de tiu ĉi jam ekzistinta tombaka medalo (maldekstre) rezultis tutan alian aspekton, tiel ke oni rajtus nomi ĝin “variaĵo”. Klara ekzemplo estas tiu medalo “Pro Musica” de la fama belga medalisto Marcel Rau, kiu retuŝis la originan stampilon kaj patinigis la rezultan kreaĵon.

La variaĵo estis plenumita per brila rando kun la simboloj de la zodiako. Malantaŭ la bildo kiu personigas la muzikon, ankaŭ brile ellaborita, la fono estis kemie patinigita ege malhele, preskaŭ nigre. Tio kreas ege brilan kontraston, kiu klare mankas en la originala medalo. La reverso (ne montrata) ne estis denove patinigita.




Antaŭ la patinigo

Post la patinigo

La dua ekzemplo estas bronza esperanta medalo. La duflanka medalo estis patinigita permane, do sen helpo de maŝino. La komisiinto, numismato kaj kolektanto, estis petinta la medaliston **ne patinigi** nur unu ekzempleron, por poste povi observi la malrapidan, spontan patiniĝon kaj post pli longa tempo povi kompari ambaŭ ekzemplerojn.

Fontoj:

- Vikipedio: “Patino”
- “Flash Medailles”, revuo de la asocio “Promotie van de medaille vzw / Promotion de la médaille asbl”, 26a jarkolekto, n-ro 3-90, septembro 2022



# VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

## Fillér-Libro-Marko el Budapeŝto



Jen la unua libromarko kiun ni priskribas en ĉi rubriko. Ĝi estis eldonita de la ESPERANTO KULTURPROPAGANDA INSTITUTO BUDAPEST.

Laŭforme ĝi estas verdblanka ortangula, denta glumarko, sed la mezuroj ĝis nun estas nekonataj, do serĉataj. Videblas krom verda steleto inter hungarecaj plantornamoj la duono de la hungara blazono (apostola duobla kruco kaj bazo por la kruco, kiun kelkfoje oni interpretas kiel tri montojn).



La du tulipoj estas ŝatata popola motivo, kaj tre praa, laŭ kelkaj opinioj hungaroj enhejmigis ĝin en Eŭropo (ankaŭ nederlandanoj sin laŭdas pro tio!).

Sube oni vidas la valorindikon “10 fillér” (fileroj). Filero estis ŝanĝmono por la tiama valuto “pengo” (hungare: pengő), pli frue kaj post la dua mondmilito por “forinto”. Tio probable indikas la prezon/valoron de la libromarko. Laŭ Jozefo Horvath, pro la malalta valoro, ĝi verŝajne ne estis valormarko.

Enigmaj restas la ruĝa “makulo” kaj la funkcio de la glumarko, kiu havas rilaton al libroj aŭ biblioteko. Eble ĝi estis propagandilo. (vidu la reverson de la poŝtkarto sur la antaŭa paĝo!)



*ENA kore dankas nian fidelan kaj aktivan provleganton Jozefo Horvath el Győr pro la informoj.*

## **POR SPUREMULOJ!**

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.*

*XXIIIa enigmo*

### **VAKSAJ SIGELOJ**



Ĉifoje ENA petas vin, se eble, sendi **informojn pri la montrata objekto**. Se ĝi estus fenomeno de la numismatika fako, por ni ĝi estus unikaĵo kaj raraĵo.

Nia ENA-retejestro Frank Merla el Germanio sendis al ni tiun foton pri la eble unika esperanta “medalo” farita el vakso. Ĝis nun ENA tute ne sciis, ke tia objekto aŭ alia samaspekta vere ekzistas.

Pri tiu fenomeno aperos baldaŭ en nia revuo en la rubriko “Aspektoj de numismatiko” artikolo kun ilustraĵoj...



## *MEDALISTOJ*

### **33. Raoul - Eugène Lamourdedieu (1877 – 1953)**



La franca artistoj Lamourdedieu estis famega skulptisto kaj medalisto kaj adepto de la tiam tre populara stilo artdekor.



*Du ekzemploj de liaj skulptaĵoj en la stilo de artdekor.*

En 1894 li ekstudis en la “Lernejo de Belaj Artoj” en Bordeaux kaj samtempe li lernis la teknikon de ksilografio. Li poste daŭrigis la artan edukiĝon en la “Lernejo de Belaj Artoj” en Parizo.

Komence li laboris en la stilo de la mondfama skulptisto Auguste Rodin, sed poste lia arta laboro estis influita de Bourdelle kaj Maillol, laŭ la tradicio de la figura skolo.

En la dudekaj jaroj li skulptis la bareliefon “La Forto”, prezentanta batalon inter viro kaj virbovo, poste prezentita en medalo.



Jen kelkaj majstroverkoj numismatikaj kiuj montras lian grandan talenton kiel medalisto



Ofte la reverso de la arĝenta medalo estas konsiderata en la Reto kiel religia medalo. Tio ne estas ĝusta. Tamen la subaj bildoj povus pruvi, ke la skulptisto por la esperanta medalo estis influita per tipa katolika temo (maldekstre). Li faris ilin ambaŭ.



## HISTORIAJ ASPEKTOJ

### Kvardek jaroj post la venko super la hitlera Germanio (1985)



Unika, ununura esperanta memormedalo pri la Dua Mondmilito

*“Finsonis la pafoj en Berlino. La 9an de majo ili finsonis ankaŭ en Prago, kie kapitulacis la lasta hitlera armea grupiĝo. Malfacila estis la vojo al tiu Venko!*

*Preskaŭ kvar jarojn – ekde la 22a de junio 1941 ĝis la 9a de majo 1945 – la soveti-germania fronto estis ĉefa en la Dua Mondmilito. Ĝia longeco atingis 6 200 kilometrojn. En la mortiga interbatalo unu kontraŭ la alia, Soveta Unio eltenis frapojn de la germani-faŝistaj hordoj, haltigis ilin kaj ekpelis reen.*

*Dudek milionojn da vivoj de siaj gefiloj, el la ĝenerale kvanto 50 milionoj da pereintoj dum la Dua Mondmilito, metis la sovetia popolo sur la altaron de la Venko de la homaro super la faŝismo.*

*Triumfa estis la parado de la Venko sur la Ruĝa Placo en Moskvo la 24an de junio 1945. Ĝia kulmino estis la momento, kiam sub surdiga tamburado estis ĵetataj al piedestalo de la Maŭzoleo de V.I. Lenin standardoj de la frakasitaj divizioj de la faŝista imperio.*

#### PLANO “BARBAROSSA”

*La 18an de decembro 1940 Hitler subskribis direktivon, ricevintan la titolon plano “Barbarossa”. Ĝi estis la plano de totala, fulmrapida milito kontraŭ USSR kun subita fortega frapo kontraŭ ĝiaj armitaj fortoj kaj vivo-centroj.*

*La ĝenerala kvanto de la germania armeo en junio 1941 atingis 8,5 milionojn da homoj. El ili 5,5 milionoj estis planataj por invado en USSR.*

*La invad-fortoj inkluzivis 153 germaniajn diviziojn, inter ili 33 tankajn kaj motorizitajn. Entute kun armeoj de la aliancanoj de la faŝisma germanio estis preparitaj por la atako 190 divizioj. Ilian frapon devis subteni kvar aerflotoj de Germanio kaj armilitaj fortoj de Finnlando kaj Rumanio.*

*Organize tiuj fortoj estis dividitaj je tri armeaj grupoj: “Nordo”, “Centro”, “Sudo” kaj aparta armeo “Norvegio”. Antaŭ ili estis starigata la tasko de fulmrapida frakaso de sovetiaj milittrupoj en ĉelimaj militaj regionoj, profunda invado, okupacio de gravegaj strategiaj centroj de la lando, inkluzive de Moskvo.*

*La germani-faŝista komandantaro ellaboris terurajn - pro sia malhumaneco - planojn de ekstermo de civila loĝantaro de USSR. "Likvidu el vi kompaton kaj kondolencon", temis en alvoko de la hitlera komandantaro al soldatoj de la Orienta Fronto, "murdu ĉiun ruson, ĉiun sovetianon, ne hezitu antaŭ maljunulo aŭ virino, knabo aŭ knabino – murdu ..."*

*Hitler kredis je fulmrapideco de la komencinta milito. Liaj esperoj baziĝis sur sukceso de la de li efektivigitaj okcidentaj militaj kampanjoj. Eŭropo estis konkerita. Nun respondo al la demando "ĉu esti aŭ ne esti" por multaj popoloj dependis de tio, ĉu eltenos USSR la mortigan interbatalon aŭ estos ankaŭ frakasita de la faŝismo.*

*Estis serioze ekzamenata ĉio sovetia – politika sistemo, ekonomio, unueco de popoloj de la lando, morala firmeco.*

### *DE LA OKCIDENTA LIMO ĜIS MOSKVO*

*La unua tago de la milito estis ekstreme tragika pro la subita invado de la faŝistaj hordoj dum la dimanĉa tagiĝo kaj superkoncentritaj frapoj de la faŝista aviado kontraŭ la dormantaj urboj. En aerodromoj estis likviditaj ĉirkaŭ 1 150 aviadiloj, ne sukcesintaj eĉ supreniĝi. Estis bombitaj militaj deponejoj kaj arsenaloj. En direktoj de la ĉefaj frapoj de la agresoro – al Moskvo, Leningrado, Kievo – supereco de la faŝistaj armeoj estis 3-5-obla.*

*Dum somero kaj aŭtuno 1941 la sovetiaj milittrupoj efektivigis persistajn defensivajn batalojn, senfortigante la malamikon.*

***Dum la unuaj dudek tagoj de la milito la faŝista armeo perdis pli multe da soldatoj kaj oficiroj, ol dum ĉiuj militaj kampanjoj de 1939-1941 en Okcidenta Eŭropo.***

*La planita por 6-8 semajnoj "orienta kampanjo" por frakaso de la sovetiaj milittrupoj kaj okupacio de Moskvo estis sufokiĝanta. Dum 73 tagoj rezistis kontraŭ la faŝistoj Kievo kaj Odeso, 250 tagojn Sevastopolo. Leningrado eltenis 900-tagan sieĝon kaj rebatis la malamikon. Survoje de la germani-faŝistaj trupoj ĝismorte staris defendantoj de la fortikaĵo de Bresto, de Smolensko kaj de multaj aliaj urboj kaj loĝlokoj, simplaj sennomaj altaĵoj, transirejoj, disvojiĝejoj.*

*Tamen dum la unuaj kvin monatoj de la milito la hitleraj hordoj sukcesis invadi en la landon profunden de 850 ĝis 1200 km. La de ili okupita teritorio superis 1,5 milionojn da kvadrataj kilometroj. Antaŭ la milito tie loĝis ĉirkaŭ 75 milionoj da homoj. Ajna lando kapitulacis en similaj kondiĉoj. Sed la sovetia popolo kaj ĝia armeo daŭrigis la batalon, senfortigante la malamikon.*

*Kvankam dum la unuaj tri semajnoj de la milito la agresoro avancis profunden en la sovetian teritorion je 20-30 km diurne, do dum ĝia ofensivo kontraŭ Moskvo en oktobro-novembro 1941, ĝi kapablis superi diurne nur 2,5-3 km. Kaj komence de decembro ĝi estis devigita tute ĉesigi la ofensivon. Ĝiaj ĉefaj frapaj grupoj estis sensangigitaj."*

**El: "Kolektanto", informbulteno de "Amika Rondo", Sekcio de BEA, 1985. Medalo priskribita de ENA en jk.1, n-ro 4, p.5**

# TERMINARO

## Alfabeto listo (34)

**albato:** alojo de arĝento, nikelo, kupro kaj zinko.

**antikvaĵo:** kolektaĵo, kiu estas antikva kaj plej verŝajne grandan parton de ties valoro ŝuldas al tio.

**brita arĝento:** alojo de 95,883% da arĝento kaj la resto konsistas el kupro.

**dublono:** hispana ora monero kun valoro de du eskudoj; ĝi pezas 6.77 gramojn. Cirkulis oficiale de 1537 ĝis 1833, ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en la hispanaj kolonioj. Ĝi estas konsiderata la monero kun la plej alta valoro iam uzita en la historio.

**ekzergo:** teknika termino por ĉio sub la elstara bordero kiu foje aperas, ĝenerale en la reverso, kiu kutime enhavas surskribaĵojn rilate la stampodaton aŭ simile.

**fabrikita kolektaĵo:** aĵo farita profitcele, specife por personoj, kiuj kolektas ĝin (ekzemple poŝtmarkojn en diversaj similaj serioj kaj koloroj).

**fonkampo:** liberaj spacoj kaj plataj surfacoj sur monero kaj medalo.

**germana arĝento:** alojo de 60% da Cu, 20% da Ni kaj 20% da Zn.

**inicialokruco:** inicialosigno uzita mezepoke por indiki la komencon de ĉirkaŭskribo, laŭ kutimo en manuskriptoj.

**inicialosigno:** signo por indiki la komencon de ĉirkaŭskribo. Mezepoke ĝenerale estis uzita kruceto kiel signo.

**interpunkcio:** signoj por apartigi vortojn en la ĉirkaŭskribo aŭ aliaj surskriboj de moneroj aŭ medaloj. Pro manko de spaco inter vortoj kaj pro ofte uzataj diversspecaj mallongigoj.

**kolektero:** ajna objekto, konsiderata havanta valoron aŭ intereson por kolektanto.

**kuriozaĵo:** malgranda, kutime fascina aŭ malkutima aĵo, serĉegata de kolektantoj.

**motivo:** portretoj, blazonoj kaj aliaj desegnoj aŭ reliefoj.

**patino:** ŝanĝo de koloroj aŭ nuancoj, pro produkto de oksidigo de la metaloj.

**pendoringo:** ringo, unuigita al la monero aŭ medalo, kiu servas por pendigi ĝin al laĉo aŭ ĉeno.

**sterlinga arĝento:** alojo de 92% da arĝento + 7,5% da kupro kaj 0,5% da germanio (Ge).

**stilo:** farmaniero de ĉiu figuro sur monero aŭ medalo.

**subskriboj:** fidendaj subskriboj de tiuj kiuj emisias monpaperon, ĉu guberniestroj, ĉu direktoroj de bankoj ...

**surskribaĵo:** ĉiu el la tekstoj de unu flanko aŭ ambaŭ flankoj.

# NUMISMATIKA FORUMO

## Ĉu monero, ĵetono aŭ medalo?



La sufiĉe novbakita asocio “Legacy Knights Numismatic Society” (LKNS) eldonis sian unuan “moneron”.

### 1. Ĉu vere tio estas monero?

Jen artikolo kiu petas la leganton decidi surbaze de difino el la “Merriam-Webster Online Dictionary” koncerne la substantivon “monero” (<https://www.merriam-webster.com/dictionary/coin>)

#### a) *“Kutime ebena peco de metalo, eldonita kiel pagilo de oficiala registaro”*

La supre montrata objekto estis stampita en eldonkvanto de iom pli ol 600 ekzempleroj, kiel ebena peco de metala aloj, konsistanta el aluminio, kupro, sterlinga arĝento kaj fajna arĝento. La privata estraro de la asocio estis tute engaĝita, tamen ne de oficiala instanco. Kvankam la modelo estis mezepoka pfenigo, la celo ne estis uzi ĝin kiel ŝanĝilon aŭ valuton, kiel funkcias mono. Laŭ tiu difino la kreaĵo ne estas monero ...

#### b) *“Metalmono”*

La objekto ekzistas el kvar diversaj metaloj. Ĉar ĝi ne estis stampita por uzi ĝin kiel pagilon, ĝi ne estas mono. Teorie ĉio povus esti mono, kio estis farita por funkcii kiel ŝanĝilo, sed tiel neniu ĝis nun uzis ĝin kaj tio krome tute ne estis la celo. Do, laŭ tiu difino ĝi ne estas monero ...

#### c) *“Io kio similas moneron, ĉefe pro la formo”*

La kreaĵo estis tiel farita, ke ĝi aspektas ne nur kiel monero sed krome estas monero koncerne substancojn kaj dezajnon! Laŭ tiu perifrazo oni vere kreis moneron! Tamen, tiu priskribo estas iom tro malserioza, ĉar homoj tro facile kontentiĝas surbaze de nur kelkaj analogioj. Tial tiu difino probable estas la malpli taŭga en serioza interparolado. Se nur gravus la aspekto, tio sufiĉus, sed ...

d) *“Unuo de kriptaj valutoj”*

La “monero” certe ne estas unuo de kriptaj valuto. La difino de unuo kiel “Bitcoin”, estante iu speco de monero, estus same, kiel difino de “hot dog” kiel speco de hundo. Do tia difino tute ne estas konforma al la koncerna objekto, ĉi tie priparolata.

**Provizora konkludo:** la LKNS-kreaĵo estas nur monero laŭ la pli maltaŭga difino, laŭ iom teknika difino, io kreita por esti eldonata kaj uzata kiel mono.

Do, ĝi vere ne estas monero!

## 2. Do eble ĝi estas ĵetono?

a) *“Peco kiu aspektas kiel monero, eldonata de iu asocio kun certa celo, ekzemple kiel por tarifo en publika aŭtobuso”*

La objekto sur la foto ja aspektas kiel monero, sed ĝis la momento de la eldono neniu utila uzo estis difinita. Certaj ĵetonoj estas uzataj kiel aŭtobusaj tarifajoj, eventuale por kelkaj popularaj ludetoj, trinkaĵoj ktp. Koncernas do pagilon por certaj antaŭe precizigitaj aplikadoj. Tio tamen certe ne estis la celo de LKNS.

b) *“Objekto kiu similas moneron, kiu de alia persono aŭ jurisdikcio estis eldonita kiel speco de mono”*

Tute ne, ĉar LKNS nek estas jurisdikcio, nek eldoninto de pagiloj ...

c) *“Unuo de kriptaj valutoj”*

Kiel jam dirite, estis eldonita palpebla objekto, ne celita kiel pagilo.

d) *“Memorigaĵo”*

➤ Fakte! Jen klara signifo. Do, objekto, kiu memorigas la asocion. Membroj kaj eĉ nemembroj rajtas konsideri ĝin tiamaniere.

➤ *“Parteto, kiu reprezentas la tuton”* (ekzemple: ĝi estas sign(a)ĵo de tio kion ni volas atingi).

Ĝi fakte montras kavaliron, krucon kaj la nomon kaj devizon en mezepoka latina. La tuto reprezentas la membraron, la lernejan originon kaj la “valorojn”. Do, “palpebla” simbolo, kiu esprimas la asocion kaj ĝiajn t.n. valorojn. Jen ege efika kaj taŭga priskribo.

➤ *“Io, kio estas donata aŭ montrata kiel garantio (kiel aŭtoritato, juro aŭ identeco).”*

Denove jes! Origine estis la intenco, ke persono povos montri ĝin, por identigi sin kiel membro, financa subtenanto, kunlaboranto aŭ alispeca subtenanto. Do, ne temas pri rajtoj aŭ kompetentoj, riceveblaj per uzo de la objekto. Eĉ se iu vendus ĝin al aliulo, ĝi ne estus monero, sed kolektaĵo!

**Provizora konkludo:** el teknika vidpunkto, tiu “asocia monero” vere estas ĵetono.

### 3. Nu, kial ne medalo?

a) *“Eta, pleje metala objekto kun religia emblemo aŭ bildo”*

Nu, ĝi estas preskaŭ same granda kiel moderna usona “cendo”, kun bildo de kavaliro kaj ... religia simbolo: kruco.

b) *“Peco de metalo, ofte kun aspekto de monero kaj stampita dezajno, kiel memorigaĵo de persono aŭ evento, pro elstareco aŭ merito”*

Tute certe! Ĝi estis kreita intence por simili al mezepoka monero. La dezajno estis stampita per martelo kaj ĝi memorigas la ekziston de samideana grupo, nome tio de LKNS, kiu jam iom estas meritinda!

**Ĝenerala konkludo:** el numismatika vidpunkto oni ne rajtas nomi ĝin “monero”. Numismatic Guaranty Council (NGC) tion ne akceptus, ĉar ĝi estis nek de laŭjuraj, nek de faktaj registaroj eldonita kiel valuto en iu jurisdikcio.

Nu, do ĉu ĵetono aŭ medalo, **laŭ vi persone?**

La “Token and Medal Society (<http://www.tokenmedal.org/FAO/FAO.html>) diras: strikte definite, ĵetono estas ĉio surrogata de oficiala monsystemo. La pli kutima aspekto de ĵetono estas tiu de metala disko, similaspekta al monero, sur kiu la valoro kaj la eldoninto estas menciitaj. Teorie ĵetonoj rajtas nur esti plenumataj de la eldoninto, sed ceteraj estis tiel disvastigitaj aŭ akcepteblaj, ke ili cirkulis kvazaŭ monero. Praktike ekzistas multaj aliaj nuancoj, ekzemple, same kiel reklamiloj, ĵetonoj estas konsiderataj ne estantaj medaloj.

La LKNS-objekto tamen ne estis eldonita, por iĝi surrogato de oficialaj valutoj. Sur ĝi krome ne videblas valorindiko.



Mezepoka monero kun kavaliro kaj kruco. Tia monero inspiris la LKNS-asocion.

Fontoj: “American Numismatic Association  
“Exonomia | Mr Norris LKNS

Tradukis Bert



# EL LA GAZETARO

## Honore al William Harmon

Prezidanto Orlando RAOLA omaĝas milion-stelan moneron (vidu la kovrilfoton) al Lusi kaj Vilĉjo HARMON (Pro ambaŭ fotoj ni dankas al Neil BLONSTEIN.)



William HARMON estas ankoraŭ relative juna viro. (Demandu al mia patro, kiu havas 93 jarojn.) Tamen, post deĵori dum 26 jaroj en la posteno de ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio en Usono, li decidis, ke venas tempo por transdoni la torĉon al iu alia.

Estas malfacile imagi, kiu povus tiom efike plenumi la taskon, kiom Vilĉjo. Li estas motoro de la Esperanto-movado ne nur en Usono, sed internacie. Kiel delegito de UEA, mi multe profitis de lia helpo kaj konsilo. Ĉiu, kiu partoprenis en la Nord-Amerika Somera Kursaro, kiam ĝi okazis ĉe la San-Franciska Ŝtata Universitato, memoras la piknikojn ĉe la bela hejmo de gesinjoroj Harmon. Kaj certe ĉiuj memoras la guston de *kedgeree*. Vilĉjo estas ankaŭ lerta preleganto kaj aŭkciisto (“okaze de dubo, kontrolu regulon n-ro 1”). En preskaŭ ĉio landskala, kaj multaj regionaj movadaj eventoj, li estis tie por reprezenti UEA-on, kaj memori pri la kialoj por membriĝo.

Vilĉjo kaj Lusi Harmon estis inter la unuaj samideanoj, kiujn mi renkontis tiam, kiam mi esperantistiĝis en la jaro 1985. Mi tiam enviis la fluecon kaj erudicion de la parolado de Vilĉjo (dum mi penis memori “Kiel vi fartas?”). Mia lingvokapablo evoluis kun praktiko, sed mi ne povas konvinki min, ke mi iam estos tiom bona oratoro.

Tial mi miris, kiam Vilĉjo proponis al mi, ke mi estu la venonta ĉefdelegito. Mi facile komprenis, ke li deziras rezigni pri la movada laboro post longa deĵoro. Sed lia logiko por elekti posteulon restas iom nebula al mi. Tamen, mi penos laŭ mia eblo fari la taskon. Mi estas certa, ke ĉiu



usona movadano, kiel mi, volas danki al Vilĉjo pro lia bona laboro. Evidentiĝis tio, dum la ĉi-jara Landa Kongreso de Esperanto-USA, kie ĉiuj surpiediĝis post lia adiaŭa parolado. Ni sentos lian mankon en la movada agado, sed ni esperas, ke ni povos daŭre profiti de lia amikeco kaj konsilo dum la venontaj jaroj.

Ĉarli GALVIN

# ***R E T P O Ŝ T O***

de vi por ni!

## **Reagoj kaj konversacioj**

18.04.2023 11:59

Estimata s-ro Bert Boon,  
Saluton el Japana Esperanto-Instituto.  
Mi pardonpetas pro la intertempa silento.  
Tamen, bedaŭrinde neniun respondon mi ricevis el la kompanio.  
Estus plej oportune preni informojn el la oficiala retejo (en la angla, taja, kaj ĉina).  
<https://www.tenshodo-global.net>  
Mi denove petas vian pardonon, pro ke mi ne povis efike helpi vin.  
Sincere,  
Aikawa Takuya, direktoro  
Japana Esperanto-Instituto (JEI)  
[esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp) | <https://www.jei.or.jp/>

19.04.2023 10:17

*Estimata Sinjoro Direktoro,  
Saluton el Belgio al vi kaj al viaj samideanoj.  
  
Sciante, ke vi penadis trovi helpon por nia revuo, mi tutkore dankas vin. Laŭ via indiko, mi konsultos la retejon de la kompanio.  
  
Danke kaj rekompence mi nun aldonas, por vi kaj por la instituto, la lastan numeron de la revuo "Esperanta Numismatiko". Krome informilon-varbilon por eventuale aboni (tute ne devige!) la revuon por via Instituto kaj/ aŭ por unuopaj japanaj samideanoj.  
  
Je viaj servo kaj dispono!  
Amike kaj numismate,  
Bert BOON*

20.04.2023 4:06

Estimata s-ro Bert Boon,  
Dankon pro viaj informoj!  
Ŝajne JEI jam estas en via dissendolisto, sed ni serĉos eblon plu utiligi la materialojn.  
Sincere,  
Aikawa Takuya, direktoro  
Japana Esperanto-Instituto (JEI)  
[esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp) | <https://www.jei.or.jp/> Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo, 162-0042 JAPANIO



18.04.2023 14:28

Kara amiko,

*Esperante, ke vi kaj la viaj fartas bone, mi denove volas peti vian helpon.*

*Tamen, unuavice mi devas mencii “teknikan”(?) problemon koncerne la paĝaranĝon de la lastaj provlegitaj numeroj. Dufoje jam la paĝaranĝo estis ege kaosa pro la faskigo de vortoj kaj vortgrupoj. Tial ni bezonis preskaŭ duonon de tago por rearanĝi la tutan numeron de niaj tajpitaj tekstoj per rekonstruo de la originala paĝaranĝo.*

*Ĉu vi havas ideon pri la kaŭzo de tiu problemo? Ĉu eble la uzo de la speciala programo kiu korektas diversajn erarojn? Ĉu la sendo per Wetransfer? Ĉu.....?*

*Eble kaj espereble la problemo povas esti solvata...*

*Dume mi jam antaŭdankas vin denove pro via grava helpo.*

*Amike,*

*Bert*

19.04.2023 19:29

Kara Bert,

mi havas nur supozojn pri la problemo.

1) Mi uzas la plej novan version de WinWord, eble mia programo refreŝigis la tekston al la lasta versio. Mi atentis estonte, ke tio ne okazu. La du versioj ne estas tute interkongruaj, ĉefe retroe.

2) Por la ortografia kontrolo mi uzas LibreOffice tiamaniere, ke mi malfermas kopion (gravas, ke nur kopion!) de la ENA-revuo en LibreOffice, la trovitajn mistajpojn mi korektas en WinWord. Tiel do pro la diversa strukturo de LibreOffice ne taŭziĝas la tekstostrukturo WinWord-a.

3) Kelkfoje inter la vortoj troviĝas superflujaj blankaj tajpoj, intervortaj spacetoj. Oni povas forigi ilin per anstataŭigo (du malplenaj spacetoj al unu malplena spaceto). Eble dume okazis troaj anstataŭigoj, forigantaj la interspacojn.

4) Pro sendo per WeTransfer neniam mi spertis tordiĝojn de la tekstoj. Mi esperas, ke nun vi ne havos tiajn problemojn.

Mi ĝojas pri la artikolo pri Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, mi renkontis ilin en iu budapeŝta UK kaj konservas pri ili agrablajn rememorojn.

Mi nur mencias, ke Komenio venis por kelkaj jaroj ankaŭ en Hungarion. Ĉi tie li skribis siajn du gravajn pedagogiajn verkojn *Schola Ludus* kaj *Orbis sensualium pictus* kaj ankaŭ instruis en la *Collegium* de Sárospatak.

Amike: Jozefo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.04.2023 14:55

Kara Bert,

koran dankon pro la alsendo de la aktuala numero de la revuo kiun mi volonte aldonis en la reto.

Pli malpli hazarde mi enrigardis la revuon kaj trovis la laŭdon de mia laboro kaj mencion de la retejo [ena.frali.bplaced.net](http://ena.frali.bplaced.net) - koran dankon! Mi ŝatus aldoni konsilon pri la ligilo en la pdf-dokumento: Estas konsilinde difini la ligilon kiel "malfermu en nova paĝo" aŭ simile. En la nuna formo oni klakante la ligilon forlasas la revuon kaj estas sendita al la retejo. Tio konfuzigas leganton, almenaŭ min.

Salutas amike

Frank Merla

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.04.2023 2:41

Saluton Bert!

Kiel ĉiam, dankon pro la gazeto.

Vi petis pli da informo pri la "milion-stelan monero" de Vilĉjo HARMON. Vi povas legi la tutan artikolon ĉe <https://bulteno.esperanto-usa.org/a/2013/04/60-harmon/> sed ĝi ne diras ion ajn pri la "monero". Dum aŭtuno de 2019 li kaj Lusi translokiĝis por loĝi en la regiono de la filo de Vilĉjo. Bedaŭrinde Vilĉjo mortis unu monaton poste, kaj nun Lusi havas demencon. Mi kaj Vilĉjo kolektis monerojn kaj poŝtmarkojn. Sed mi entute forgesis pri tiu "milion"-stelaĵo. Mi devos peti informon de lia filo por koni kio okazis al la kolektaroj de Vilĉjo.

Ĉion bonan!

[trio@esperanto.org](mailto:trio@esperanto.org) <=> 三人 <=> <http://trio.sen.limo/> #Esperanto , The International Language! What's that? <http://Esperanto.Org/>

28.04.2023 18:11

*Kara amiko Trio,*

*Unuavice multan dankon pro via reago koncerne la revuon. Tute ne dankinde!*

*Ege interese legi viajn informojn pri kormemora samideano Harmon. Estus granda helpo, se vi povus trovi detalojn pri la medalo danke al la filo!!!!*

*Mi antaŭdankas vin pro via penado.*

*Kroma pripenco: ĉu vere ekzistas nur kelkaj usonaj esperantaj medaloj aŭ moneroj? Nekredeble...*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

22.05.2023 18:55

*Kara Jozefo!*



*Mi petas vian helpon koncerne la montratan valormarkon*

*Kie(l) oni uzis tiun markon? Ĉu eble por ricevi rabaton? El kiu epoko ĝi devenas?*

*Mi antaŭdankas vin tutkore,*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

24.05.2023 9:18

Kara Bert,

la libromarkon eldonis Esperanto Kulturpropaganda Instituto, do ĝi datiĝas inter la du mondmilitoj. Inter hungarecaj plantornamoj videblas krom la verda stelo la duono de la hungara blazono (apostola duobla kruco kaj bazo por la kruco, kiun kelkfoje oni interpretas kiel tri montojn). La du tulipoj estas ŝatata popola motivo, kaj tre praa, laŭ kelkaj opinioj hungaroj enhejmigis ĝin en Eŭropo. Sube videblas: 10 fileroj (filero estis ŝanĝmono por la tiama valuto pengo [hungare pengó], pli frue kaj post la dua mondmilito por forinto). Dek fileroj montras verŝajne la prezon de la libromarko, pro la malalta valoro ĝi verŝajne ne estas valormarko laŭ mia opinio. Pri la ruĝa makulo mi scias nenion. Ĉu hazarda makulo? Ĉu stampo?

Jen tiom mi scipovis deĉifri.

Kun amikaj salutoj: Jozefo



25.05.2023 20:46

Estimata S-ro Boon,

mi estas sudamerika esperantisto, iama estrarano de UEA, ktp.

Pro diversaj kialoj, mi bezonas vendi medalon kiun mi posedas, mem honore ricevitan antaŭ pluraj jaroj. Mi tamen dezirus ke ĝi restu ĉe numismatika kolektanto en nia lingvokomunumo mem, do kapabla aprezi ĝian realan signifon.


Ĉi-kune mi alkroĉas fotojn de tiu kolektindaĵo.

Baldaŭ mi havos la ŝancon ensendi la medalon el Germanio, kio ŝpare malaltigus la sendokoston al iu lando en Eŭropo.

Mi ŝatus scii ĉu vi mem interesiĝus pri ĝi, aŭ ĉu vi povus sciigi iun eventualan aĉetunton. Mi ŝatus resti anonima, ĉiel ajn.

Kore,

J. A.V.



27.05.2023 11:02

*Estimata S-ro,*

*dankon, ke vi pensis al mi por proponi vendon de esperanta medalo. Kiel vi trovis mian adreson? Ĉu vi konas la fakgrupon ENA, kiun mi fondis antaŭ dek jaroj??*

*Bedaŭrinde por vi, kiel kunlaboranto de UMEA jam delonge mi ricevis en mian kolekton du ekzemplerojn de la koncerna medalo. Mi do cerbumis kiel servi vin. En la ENA-grupo estas 162 individuaj membroj en 45 landoj, kiuj regule ricevas la ENA-revuon. La venonta numero aperos fine de julio. Mi povus publikigi vian anoncon, sed tiam mi evidente bezonus ankaŭ publikigi vian retadreson kaj la bazan, de vi proponatan, prezon.*

*Mi esperas, ke mi iel povus pozitive kontribui al via projekto.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*



**A N O N C O J**

**&**

**E V E N T O J**

La aŭkcio de steloj-moneroj la 11an de majo 2023 en la renoma aŭkcio Dorotheum en Vieno estis tre sukcesa.

Vendiĝis du serioj de 1 + 5 + 10 + 50 (arĝento) + 100 (arĝento) steloj kontraŭ 268 respektive 390 eŭroj (kun aldonitaj 22 % por imposto).

<https://www.dorotheum.com/en/1/8516512/>

<https://www.dorotheum.com/de/1/8516515/>

La sekva aŭkcio okazos en novembro 2023.

Elkoran saluton de Walter

Auktion aŭkcio Dorotheum Steloj 2023 05 11 Los 1027 + 1028



◀ ZUM AKTUELLEN LOS



Lot Nr. 1027

Esperanto-Steloj

Verkauft EUR 220

Startpreis:

**EUR 130**

Serie zu 1, 5 und 10 Steloj 1959 (geprägt 1960 in Utrecht), AR 50 Steloj 2020 (Auflage 300 Stk.), AR 100 Steloj 2018 (geprägt 2017, Auflage 1000 Stk.), beide geprägt in Wien. Dabei Heft zum Steloj Geld der Esperantogemeinschaft I/PP



Lot Nr. 1028

Esperanto-Steloj

Verkauft EUR 320

Startpreis:  
**EUR 130**

Serie zu 1, 5 und 10 Steloj 1959 (geprägt 1960 in Utrecht), AR 50 Steloj 2020 (Auflage 300 Stk.), AR 100 Steloj 2018 (geprägt 2017, Auflage 1000 Stk.), beide geprägt in Wien. Dabel Heft zum Steloj Geld der Esperantogemeinschaft I/PP

spesmilo – aukcio

London Coins Ltd

Auction 181 3-4 Jun 2023

Pre-sale bidding for Day 1

closes in 22 days 14 hr 40 min



Lot 980

Starting price: 40 GBP

Minimum bid: 40 GBP

Esperanto - International Language Fantasy Coinage Spesmilo 1912 25th Anniversary of the first publication of the language X#1, 30mm diameter in silver, 12.62 grammes, Struck at Holy Freres, Switzerland, EFestimate: 40-60 GBP

Vendita: La monero „1 spesmilo“ vendiĝis kontraŭ 110 britaj pundoj (128 €).

## Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol naŭ jaroj ĝis 163 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

**Vi krome rajtas unue peti provnumeron!**

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

[bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)